

Porpacaj dialogoj: partaj interkonsentoj diskonigitaj en Havano.



La intertraktantoj de la kolombia registaro kaj de la FARC-EP diskonigis la malnetojn kompletajn de la tri interkonsentoj partaj atingitaj en la procezo de paco, proksimume 65 paĵojn, kun la celo pliigi la “travideblon” kaj haltigi la “malbonintencan” elcerbumaĵojn pri la dialogoj.

En komuna komunikado diskonigita en Havano, la intertraktantoj asertis ke ekde la komenco de la dialogo, de antaŭ 22 monatoj en Kubo, ili informis laŭ la “plej fidinda maniero” la avancojn de la dialogo, sed “persistas ĝiaspekcaj elcerbaĵoj pri la interkonsentoj”.

“Pro tio, kaj kiel maniero esprimi travideblon, ni decidis publikigi la tekstojn de la komunaj malnetoj”, ili indikis kaj emfazis ke ties ekfunkciigo “reprezentus enorman avancon” en la bonfarto, garantio pri rajtoj kaj politika partopreno kaj demokratia malfermo por la paco.

La estro de la intertraktantoj flanke de la registaro, Humberto de la Calle, alparolis antaŭ la amaskomunikiloj en Havano por klarigi tian decidon, en kiu li defendis la konfidencecon kiel “necesa por povi diskuti malferme kaj avanci” en la procezo, kaj memorigis ĝion faritan de ambaŭ partneroj por informi pri siaj kunsidoj.

Temas pri interkonsentoj rilate al la tero, politika partopreno kaj kontraŭleĝaj drogoj, la tri temoj pri kiuj estis jam interkonsentoj partaj ekde la komenco de la dialogo en novembro 2012 por ĝesigi pli ol 50-jaran armitan konflikton en Kolombio.

La kvara debato-punkto rilatas al tiu de la viktimoj, diskutata ekde a?gusto kaj kies progreso ankora? ne estas informita.

De la Calle insistis pri tio ke nun la kolombianoj povos havi propran opinion sciante la interkonsentojn kaj komparante ilin kun la informoj ricevita? de amba? partneroj dum la lastaj monatoj.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/34655-porpacaj-dialogoj-partaj-interkonsentoj-diskonigitaj-en-havano>



Radio Habana Cuba